

## *Esploro pri la Doktrino*

Alagaddupama Suto (Maĥhima Nikajo 22)

蛇喻經

tradukis **Bayard Elton** k **Geo Yoxon**, Britio

Unu bonzo, nomita Arittho, venis al ĉi tiu erara ideo: “Ĉi tiel ni komprenas la instruon de la Beatulo, ke la faroj, kiujn li nomis katenoj kaj malhelpaĵoj, efektive ne ligas aŭ baras tiun, kiu faradas ilin.”

La frataro de sanghanoj, kiam ili sciiĝis pri tiu opinio de Arittho, penis vane deturni lin de liaj eraraj ideoj, kaj fine protestis pri li al la Sankta Gotamo. La Beatulo petis, ke Arittho venu antaŭ li, dirante:

“Malfeliĉulo, ĉu vi efektive lernis, ke tio estas la doktrino instruata de mi? Ĉu mi ne informadis, ho, senspritulo, multmaniere kaj multrilate, pri tiuj aferoj, kiuj erarigas la iradon de tiu, kiu sekvas ilin? Mi jam klarigis la senutilon kaj danĝeron de deziroj, ĉiam nesatigeblaj, malesperpleaj, entute mizeraj; ĉu ne?”

Sinturnante al la frataro, la Beatulo demandis: “Ĉu rezultis multe da konflikto kaj malpaco inter vi, pro tiu ĉi viro?”

“Efektive, ne, Sinjoro.” ili respondis.

“Ĉu vi, ho sanghanoj,” ankoraŭ demandis la Beatulo, “kompreans ke tiel mi instruadas, ke la faroj, kiujn mi nomas katenoj kaj malhelpaĵoj, efektive ne nepre ligas aŭ baras la bonan progreson de tiu, kiu faradas ilin?”

“Nepre ne, Sinjoro. Multmaniere la Sankta Gotamo jam klarigis al ni pri tiuj aferoj, kiuj estas malutilaj, kaj ke ili malbone efikas ĉe tiuj, kiuj ajn cedas al ili. Nesatigeblaj estas deziroj, la Sankta Gotamo jam diris, dolorigaj, mizeraj kaj malesperigaj ili estas.”

“Tio estas bona, fratoj! Tiel vi komprenu la Doktrinon instruatan de mi. Vere, mi multmaniere klarigis al vi pri la aferoj, kiuj malutilas; tamen, tiu ĉi malsaĝa frato Arittho propravole misinterpretis la doktrinon, kaj tiel misprezentas nin, malutilante kaj malfeliĉante sin mem. Ĉar, vere, la tenado de malbona deziro en la menso estas preskaŭ kiel grava kulpo, kiel la efektivigo mem de deziro.

Multaj malfeliĉuloj studadas la Doktrinon kaj ellernas ĝian diversajn instruojn, tamen, ili ne sukcesas kompreni la signifon. Ili kapablas citi tekstojn kaj argumenti, sed ili ne sukcesas atingi pravan komprenon, ĉar ili ne ĝuste konceptas la Doktrinon.

Ankaŭ estas multaj aliaj kiuj, tute ne koncernataj pri argumentado, elserĉas la signifon de la Doktrino kaj komprenas ĝin. Tial memoru ĉion, kion vi povas koncepti

pri la signifo de la Doktrino, kaj pri tio kion vi ne povas kompreni, demandu de mi, por ke vi estu bone informita.

Aŭskultu la parabolon pri la floso. Unu viro, kiu faris longan vojaĝon, venis al tie, kie varis lian vojon larĝa kaj rapida rivero. Li sopiregis atingi la sekurecon, kiu troviĝas, tiel li bone sciis, sur la kontraŭa bordo, kontraste al la multaj danĝeroj kiuj minacis lin sur la bordo, kie li tiam staris. Li pensis: 'Tie ĉi estas nek boato nek ponto, per kiu mi povas transiri, tial mi devas kolekti branĉojn kaj alian lignon por fari floson.' Tiel li faris, kaj sur la floso li portiĝis kaj sin direktis malfrapide kaj sendomaĝe trans la akvo. Kiam li atingis la alian bordon, kiel li tiam agu, fratoj? Ĉu li kunportu kun si daŭrigante la vojaĝon, la bone konstruitan flosan, kiu tiel efike utilis al li, peze ŝarĝanta lin sur la dorso, aŭ ĉu li lasu ĝin tie sur la bordo de la rivero?"

"Li lasu ĝin tie, Sinjoro."

"Ĝuste. La viro agus ĝuste tiel farante. Tiel same, fratoj, mi metas antaŭ vi mian instruon, kiel flosan; destinita por saviĝo, ne destinita por tenado. Laŭ la kompreno de la parabolo de la floso, fratoj, vi devas finfine forlasi eĉ tion, kio estas ĝusta kaj utila - nu, kiel pli grave estas, do, ke vi forlasu ĉion, kio estas malutila kaj senutila."

"La ordinara neinstruita homo, kiu ne scias la Doktrinion, havas iujn erarajn opinion. Li malprave imagas ke lia korpo, liaj emocioj, liaj pensoj, liaj perceptoj, kaj eĉ lia persona konscio konsistigas la Egoon. Li vidas sin mem kiel senŝanĝa kaj nemodifebla en sia Egoo tra la eraoj de la eterneco, kaj asertas ke li mem estas ĉiame la sama.

Aliflanke la bone instruita disĉiplo, edukita pri la Doktrino, edukita en la Disciplino, rigardas sian korpon objektive. Li pensas: <Tiu ĉi ne estas Egoo mia. Tio ĉi mi ne estas.> Sammaniere li rigardas siajn emociojn, siajn perceptojn, siajn pensojn kaj eĉ sian personan konscion. Kion ajn li perceptas kaj rekonas per la menso, li tion pripensas: <Tio ĉi ne estas mi.> Ankaŭ koncerne la akceptitajn ideojn pri la mondo kaj ĝiaj rilatoj al la Egoo, kaj rilate al la ideo pri senŝanĝe ekzistanta estonta stato de la animo, li pensas: <En ĉio ĉi mi ne estas koncernita. Tio ĉi ne estas memo mia.> Tiel pensante, li estas serena, trankvila kaj sentima."

Unu frato en la aŭskultantaro, kiu aŭdis tiujn ĉi vortojn, demandis: "Ĉu povas esti, Sinjoro, ke estiĝu timo kaj konfuziĝo pro eksteraj kaŭzoj?"

"Jes, tio ja povas esti," respondis la Budho, "ĉar oni eble pensus: <Ve, iam mi gajnis konsolon el la malnovaj kredoj, sed nun ili estas forprenitaj de mi.> Sed, se oni ne rigardas la afereon tiel, tiam li fariĝas serena kaj memfida. Homo malsaĝa povus pensi al si: <Kie nun estas mia Egoo? Tiu ĉi Doktrino, kiu kondukas al la fino de ĉiuj inklinoj kaj la tuta soifo al la vivo, detruos min mem, kaj mi ne plu ekzistos.> Tiel priplorante pri si, tiu homo baldaŭ venkiĝus de konfuzo kaj timo. Sed saĝa homo ne tiel opinias. Li ne pensas: <Jen tiu ĉi Doktrino, kiu kondukas al la forpelo de malbono, al la detruo de la avido al ekzistado, kaŭzos ke ankaŭ mi mem malaperos.> Tiel li ne konsideras la

aferon, kaj tial li restas trankvila kaj serena, kun kreskantaj fortenco de la menso kaj nekonsternebleco.

Ĉu vi imagas, ke vi povus havi ian posedaĵon, kiu restus senŝanĝa ĉiamdaŭra eterne? Tute ne. Ĉu vi konas ian staton de memkzisto en kiu malĝojo kaj malfeliĉo estas por ĉiam forigita? Ne; kaj ankaŭ mi ne konas tion.

Respondu al mi, fratoj: se ekzistus egoo, ĉu ne ankaŭ ekzistus propraĵo mia, apartenaĵo mia?"

"Jes, tiel estus, Sinjoro."

"Tamen, pro tio ke io kiel Mi kaj Mia nenie troviĝas, kio restas al la teorio de la ĉiamdaŭra Egoo? Ĉu la korpo, la emocioj, la perceptoj, la pensoj, kaj la persona konscio estas senŝanĝaj aŭ ne?"

"Ili estas malkonstantaj, Sinjoro."

"Tio, kio estas malkonstanta, do, ĉu ĝi produktas malĝojon kaj malfeliĉon aŭ ne?"

"Ĝi estas malĝoja, kaj kondukas al malĝojo."

"Ĉu estas eble, ke io tia povas esti rigardata kiel la Egoo, kaj pri ĝi diri: <Tiu ĉi estas mi. Tiu ĉi estas mi mem.>?"

"Ne, Sinjoro."

"Tial, fratoj, atentu ke vi rigardu tiujn ĉi aferojn el ĝusta vidpunkto, kaj tiel faru finon al nescio, al mizera rondiro de renaskiĝado, al la avido al ekzisto, al la Kvin Katenoj, kaj al fiero. Tiel, kun menso liberigita, la meritinda frato ne plu estas forlegebla.

Multaj asketuloj kaj brahmanoj akuzas min pri tio, ke mi estas detruanto, ke mi estas predikanto de eksteraĵo, sed tio ne estas. Ĉar mi vere deklaras, nun kiel ĉiam, ke mia predikado sole elmontras la veron de malĝojo, kaj la Vojon al la liberiĝo el malĝojo. Tamen, kvankam homoj min mallaŭdas, mi ne koleras kontraŭ ili, nek feliĉigas min la laŭdo de homoj.

"Tial, fratoj, restu aparte en rilato al ĉio, kaj preta forlasi ĉion, kio ne estas la via. La korpo ne estas la via; la sentoj ne estas la viaj; perceptoj ne estas la viaj; pensoj ne estas la viaj; eĉ la persona konscio ne estas la via. Fariĝu aparteca rilate al ili ĉiuj. Longe tia liberiĝo alportos al vi feliĉon kaj bonfarton.

Tiel mi ĉiam instruis la Doktrinion. Kaj ĉiuj feliĉuloj, kiuj tiel forigis malfeliĉon, kiuj jam faris tion, kio estas farenda, kaj forĵetis de si la kateniĝon de ekzistado, estas liberigataj pro la perfektigo de saĝeco. Por ili jam ne restas kaŭzo por plua vagado kaj suferado.

Tiuj, kiuj jam forigis la kvin katenojn de la monda vivo, nome, sensajn dezirojn, malbonvolon, maldiligenton, maltrankvilon, kaj heziton, renaskiĝas en ĉiela mondo kaj el tie atingas la stataon pro kiu plua reveno al tiu ĉi mondo ne necesas.

Tiuj, kiuj liberiĝas de la tri katenoj, sensaj deziroj, malbonvolo, kaj dubo, renenas al tiu ĉi mondo nur ankoraŭ unu fojon, antaŭ ol fari finon al suferado por ĉiam.

Tiuj, kiuj, laŭ sia kapablo, kiel eble plej bone konformeme priatentas la Doktrinion, sendube atingos finfine al plena luminiĝo.

Kaj ĉiu ajn, kiu sin turnas al mi kun fido kaj amo, tiu renaskiĝos en ĉiela mondo.”